# ?efministro de Kubo akceptis ambasadorojn de ?inio, Vjetnamio kaj Japanio



**Foto: Granma**

Havano, sep 7 (RHK) La ?efministro de Kubo, Manuel Marrero Cruz  akceptis ?i-vendrede la ambasadorojn de ?inio, Vjetnamio kaj Japanio, kiujn li dankis pro la intereso de iliaj nacioj plifortigi kaj pligrandigi ligojn kun la plej grandaj insulo de Antiloj.

La registarestro la?dis al ambasadoro Hua Xin la bonegan staton de la dulandaj rilatoj inter ?inio kaj Kubo, kiu ?i-tie la 28-an de septembro atingas la 64-an datrevenon de sia starigo.

Siaflanke, la ?ina diplomato transdonis salutojn de ?efministro Li Qiang kaj emfazis, ke duflankaj rilatoj estas ekzemplo de solidareco kaj reciproka subteno inter landoj, kiuj havas la intereson konstrui komunumon kun komuna estonteco.

En la Palaco de la Revolucio, sidejo de la ekzekutivo, Marrero Cruz anka? akceptis Le Quang, ?us nomumitan ambasadoron de Vjetnamio en Havano, al kiu li esprimis la admiron de la kubanoj por la gloroj de la vjetnama popolo kontra? koloniismo kaj imperiismo.

"Nia lando provizos la tutan subtenon por ke vi havu fruktodonan diplomatian laboron," certigis Marrero Cruz al Quang; dume, la ambasadoro rekonis la forton de duflankaj ligoj kaj ratifis la subtenon de sia registaro al la kariba lando.

Poste, la ?efministro akceptis la japanan ambasadoron, Hirata Kenji, kiu kompletigas sian mision en Havano, post tri jaroj en kiuj estis efektivigitaj pluraj komunaj kunlaboraj projektoj, la? la japana diplomato.

La ?efministro dankis sron. Keiji pro siaj kontribuoj al la firmi?o de duflankaj rilatoj, "kiuj havas historian karakteron kaj bazi?as sur reciproka respekto", li rimarkis.

Same, li la?dis la tradician kunlaboron de Japanio kun la popolo de Kubo, kaj ekzempligis per la ina?guro de la projekto por la muntado de ampleksa inteligenta elektra energiprodukta sistemo, en la speciala municipo Isla de la Juventud.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/364590-cefministro-de-kubo-akceptis-ambasadorojn-de-cinio-vjetnamio-kaj-japanio

**Radio Habana Cuba**